Une langue pour l'Europe? Mais oui! pour sauter les langues de l'Europe de André Cherpillod. Courgenard: La Blanchetière, 2003. 79p. 21cm. Franclingva priskribo pri eventualaj solvoj de la eŭropaabelo. €4,50.

Matematika vortaro kaj oklingva leksikono de Marc Bavant. Dobřichovice: Kava-Pech, 2003. 231p. 21cm. bind. Ĉirkaŭ 1 300 terminoj kaj 1 500 nocioj, kun klarigoj en Esperanto kaj ekvivalentoj en la lingvoj ĉeĥa, germana, angla, franca, hungara, pola kaj rusa. €19,80.

Murdo en Boterhamo de István Ertl. Roterdamo: Bero, 2003. 86p. Ĉu konatan politikiston mortigis esperantisto? Ne suferu pro nescio! €9,00.

Nemeza / Nemesis de Alfred Nobel.



El la sveda tradukis G. Gällmo. Stokholmo: ESE, 2003. 22cm. bind. Dulingva: Esperanta-sveda. Kvarakta tragedio, kun profunda kontraŭkatolika, kontraŭkristana fono. €27,00.

8 000 frazeologiaj esprimoj Esperantaj. Tralaborita kaj kompletigita eldono de la Dom-fabriko; de A. Csiszár, K. Kalocsay.

Budapeŝto: KAL-ĈI/Dokumentaro, 2003. 215p. 21cm. Pli ol mil kapvortoj kun ties familio de vortkonstruoj, idiotismoj, parolturnoj ks.: alfabeto ordigitaj. €30,30.

La pereintoj in memoriam de Zofia Banet+Fornalowa. Czekadź: Hejme, 2003. 279p. 21cm. Prezento de ses pollandaj esperantistoj kies vivo estis ĉesigita de la Holokaŭsto: Leo Belmont, Halina Weinstein, Edvardo Wiesenfeld, Jakobo Ŝapiro, Izrael Lejzerowicz kaj Salomon Kornfeld-Grenkamp. €27,00.

Planned Languages: from Concept to Reality. Redaktis Klaus Schubert.

Bruselo: Hogeschool voor Wetenschap en Kunst, 2001. 257p. 24cm. Ok studoj diverslingvaj pri la demando kiel planlingvo evoluas al efektiva lingvo. €24,00.



Rapide pasis la temp' de Eli Urbanová. Ilustris P. Rak. Dobřichovice: Kava-Pech, 2003. 91p. La plej freŝa verko de la konata ĉeĥa poetino; enestas ne nur poemoj sed ankaŭ kelkaj prozaĵoj. €6,60.

Rusa novelaro: la 19a jarcento. El la rusa tradukis diversaj. Kalinigrado: Sezonoj, 2003. 400p. 21cm. bind. La unua volumo de Rusa antologio; enestas verkoj de Puŝkin, Lermontov, Gogol, Turgenev, Dostojevskij, Tolstoj, Ĉeĥov k.a. Prezo: €30,00; (aŭ £21,00 de EAB*)

La sagao de Njal. El la islanda tradukis Baldur Ragnarsson. Antverpeno: FEL, 2003. 357p. 21cm. La plej longa inter la



'sagaoj de la islandanoj' kaj, laŭ iuj, la plej elstara el arta, stila kaj psikologia vidpunktoj. €18,90.

La tria frato Teoristo: detektiva rakonto de Jeronimas Laucius. El la litova tradukis V. Banaitis. Vilniuso: Tri Steloj, 2003. 16p. 29cm. Ilus. Edukplena fabelo en kiu fikcio interplektiĝas kun elementoj de realo. €4,50.

Veturu al piedpilklando! de Jeronimas Laucius. Ilustrita. El la litova tradukis I. Tamoŝiūnienė. Vilniuso: Tri Steloj, 2003. 16p. 29cm. Kvazaŭmoko de la absurdo, kiun atingis la hodiaŭa sportado. Precipe, sed ne nur, por infanoj. €4,50.

La vivo de Henriko Kvina de William Shakespeare. El la angla tradukis Humphrey Tonkin. Roterdamo: UEA, 2003. 158p. 21cm. Kun ampleksa enkonduko kaj multaj subtekstaj notoj de la tradukinto. Sendube granda helpo por kompreni la originalon. €12,00.

Vivo nova / Vita nova de Dante Alighieri. El la itala tradukis E. Dondi. Chapecó: Fonto, 2003. 167p. 21cm. Dulingva: Esperanta-itala. La unua amromano de la itala literaturo. €10,50.


La Zamenhof-strato de R. Dobrzyński. Kaunas: Varpas, 2003. 288p. 21cm. bind. Interparoloj kun la nepo de L.L. Zamenhof. €18,00.

La postdomo. Paŭsaĵo de István Ertl. Ilus. Roterdamo: Bero, 2003. 85p. 18cm. Humurplena satira romaneto (kun movada fono) en kiu 'fikcio kaj realo koincidas'. €9,00.

Sensorteco de Imre Kertész (Nobel-premiito en 2002). El la hungara tradukis I. Ertl. Antaŭparolo de H. Tonkin. Budapeŝto: Aranygolyó? 2002/3. 207p. 20cm. bind. Pli ol membiografie inspirita transviv-rakonto elkoncentreja: romano kiu elmontras la kapablon de la homo adaptiĝi al cirkonstancoj, sistemoj kaj reĝimoj plej malhomaj. €13,50.

Tilla de Spomenka Ŝtimec. Pisa: Edistudio, 2002. 179p. 21cm. Kun fotoj. Romano en elstara stilo pri la vivo de la aŭstri-hungara aktorino Tilla Durieux. €15,00.

La Zamenhof-strato de Roman Dobrzyński. Kaunas: Varpas, 2003. 288p. 21cm. bind. Interparoloj kun la nepo de la iniciatinto de Esperanto. €18,50



Kompaktdiskoj:

Du paroladoj de Ivo Lapenna I. Fondaĵo Ivo Lapenna, 2003. 66 min. Enhavas la du paroladojn *Esperanto kiel lingva esprimo kaj instrumento de humaneca internaciismo* (Graz, 1987) kaj *Lingva diskriminacio* (Nuremburgo, 1964) de kredible la plej elstara Esperanta oratoro. €15,00.

Du paroladoj de Ivo Lapenna II. Fondaĵo Ivo Lapenna, 2003. 58 min. Enhavas la du paroladojn *Cent jaroj de parola Esperanto-kulturo* (Graz, 1987) kaj parolado dum la solena inaŭguro de la monumento *La Espero* en Graz, 1987. €15,00.

Esperanto-literaturo. Redaktis Ziko M. Sikosek. Roterdamo: UEA, 2003. Dokumentoj el la sonarĥivo de UEA; legas aŭ recitas i.a. W. Auld, D. Charters, T. Jung, K. Kalocsay, N. Rytjkov, B. Ragnarsson, M. Sloper. €9,90.

Lernu! Roterdamo: TEJO, 2003. Multlingva KD por konatigi kun Esperanto kaj instrui ĝin. Enhavas kurson kun sono kaj bildoj, vortarojn, interagajn ekzercojn kaj pli. €9,00.

Vidbendo:

Litova kalendaro: Festoj, moroj, tradicioj. de Arvydas Barysas. El la litova. Kaunas: A. Barysas, 2003. 45 min. Ekskurso tra la popolaj festoj kaj tradicioj de Litovio laŭ la jar-sezonoj. (PAL-SECAM) kaj DVD. €6,90.

• **Internet bookseller www.amazon.co.uk** now stocks a fair selection of Esperanto books. Just search under 'Esperanto'.

From David Withey to friends

Dear editor,

In 2001 I was struck down by a severe heart condition and I find it difficult to come to terms with the effects of this illness. Perhaps you could find space for a little note to my Esperanto friends and contacts who have held communication with me over the year and apologise to them for my current neglect of them.

David Withey, Liverpool

**Constitutional query**

Dear editor,

Before voting on the resolutions for constitutional change in EAB, perhaps members may like just to take a couple of steps back, take in a deep breath, and ask: 'Why?'.

What has changed? Does any of this actually relate to the promotion of Esperanto? How could a simple question from *NetNews* have resulted in three AGMs of constitutional

wrangling? Why do we need to change the constitution in order to partially reverse changes brought in without consultation in the first place?

And what's all this obfuscation with 'members', 'full members', 'members with voting rights', 'paid-up members'? Until the previous constitutional amendment, it was quite simple: we had members. Is EAB still a membership association, in the sense that BEA was? Your president insists that it is not.

Is it any wonder that we now need to reduce the quorum?

Ian Fantom, FEAB, Newbury

Clarification: Justifications for the currently proposed amendments were given in the last issue of *Update* (23, pages 3–4). The constitution was last amended in 1997, and none of the current amendments is intended to greatly change the way the association is run, so I think it is not too soon to propose these

changes, and I hope that not much wrangling will be required.

'The creation of a range of membership categories, to offer more convenient and affordable options to potential members' was agreed at the AGM in 1995. 'Full members' and 'members with voting rights' are the same thing, as is made explicit by one of the current amendments. The expression 'paid-up members' has not been used, as far as I know.

EAB is a registered charity, unlike the former BEA, which is an important difference, but I hope that EAB will continue to be governed by its members.

The constitution did not previously specify a quorum for the committee. The old 'Regularo' specified half, with the committee then having at least 8 members. Under the current proposals the committee can have as few as 6 member, but the quorum is fixed at 4.

Edmund Grimley Evans,
President

POR HARMONII KUN ALIAJ

... NECESAS UNUE HARMONII EN SI MEM

Luj kredas, ke ili estas la centro de la universo, ĉirkaŭ kiuj ĝi pivotas. Sed tiu, kiu malakceptas, ke li aŭ ŝi estas parto de komunumo, iam spertos ĉagrenon kaj amaran malriĉon. Kaj homo estas signifa, kiam lia koro malplenas.

Necesas unue rekoni siajn plej profundajn proprajn bezonojn kaj permesi, ke ili disvolviĝu. Tro ofte oni forpuŝas ilin. Oni trovu la vojon al sia propra fonto, kiu ekzistas en ĉiu homa koro. Tio estas la unua paŝo al la aliaj. Ĉiu ajn kresku al sia destino. Oni malkovru sin mem kaj akceptu sin. Nur kiam

manifestiĝas eksteren tiuj plej profundaj bezonoj kaj deziroj, oni akiras vizaĝon de homo. La subkonscia malamo fordrivas. Rankoro kaj frustrigo forfandiĝas kaj venĝemo malaperas. Tiam homo ja povas akcepti la aliajn tiajn, kiajn ili estas. Homo ja estas nur homo.

Ne blindiĝu pro belaj vortoj, prestiĝaĉoj, titoloj aŭ socia statuso, malantaŭ kio multaj homoj kaŝas sin. La vera homo difiniĝas per sia interno. Tie troviĝas liaj veraj riĉo kaj forto.

Ĉiu scias, ke li aŭ ŝi, profunde en si povas aŭdi voĉon, kiu alparolas en klara, simpla lingvo.

Sed multaj silentigas ĝin, ĉar ĝi estas postulema kaj senkompromisema. Ni ofte timas tiun fonton de saĝeco. La socio kaj nia racio komplicas por surdigi nin por tiu voĉo. Oni respektive kovu tiun trezoron. Necesas kuraĝo por aŭskulti ĝin kaj konservi harmonion inter la voĉo profunde en ni.

Ni ofte frustriĝas pro la konduto de aliaj. Provo ŝanĝi la aliajn kutime fiaskas. Finfine restas nur la ebleco ŝanĝi sin mem. Kiam ni sentas frustrigon pro alies konduto, tio eventuale estas signalo, ke ni nekonscie konfrontiĝas kun 'spiegulo' de niaj propraj mankoj.

'Movado Sen Nomo', Belgio

Itala Radio petas reagojn

La itala radio (RAI) nun elsendas en Esperanto (krom mallongonde kaj satelite) ankaŭ interrete, ĉu rekte, ĉu registrite (dum la tuta semajno oni povas aŭskulti la sabatan elsendon), ĉe la ttt-paĝo <www.international.rai.it/radio/multilingue/presentazioni/esperanto.shtml>. Per la sama paĝo, klikinte ĉe 'QSL card', eblas ankaŭ sendi raportojn pri aŭskulto, al kiuj RAI Internacia aŭtomate respondas per elektronaj konfirmokartoj. La formularo momente estas en la itala kaj angla, sed Antonio De Salvo, tradukisto de la Esperanto-programoj de RAI, jam atentigis pri la oportuno disponebligi tekston en la unuopaj lingvoj, do ankaŭ en Esperanto. La redakcio de RAI Internacia havas konstantan superrigardon pri la ricevitaj raportoj. Ĉar oni nun diskutas ĉu konservi ĉiujn dudek ses dissendatajn lingvojn, vasta reago de la esperantistoj estas nepre bezonata, per sendo de raportoj pri aŭskulto, por ke la Esperantlingva programo daŭre ekzistu. Itala Radio Internacia (RAI) – Esperanto, C.P. 320, I-00100 Roma, Italio; rete: ondacorta@rai.it (startas aŭtomate, klikinte ĉe 'mail' en la hejmpaĝo). Por reta (persona) kontakto kun Antonio De Salvo, la adreso estas: /trad.esperanto@rai.it/.

Unika nova Irana Esperantisto

La dulingva revuo *Irana Esperantisto*, kiu aperas en Esperanto kaj la persa, havas artikolojn kaj informojn pri lingvaj aferoj, la Esperanto-movado, irana kulturo, historio, literaturo ktp. La revuo estas unika pro tio, ke oni povas aĉeti ĝin en ĉiuj gazetarbudoj tra la lando. La jar-abono por kvar numeroj estas 24 eŭroj, inkluzive de la sendokosto (pagebla al UEA-konto iece-h). Paralele kun la plialtiĝo de la kvalito, plidikiĝo al 44 paĝoj kaj la kresko de eksterlandaj abonantoj, oni nun bonvenigas

With this issue of EAB Update

There are several interesting inserts with this issue!

- This newly produced **booklist** is surely a great improvement on what has been available to EAB bookworms during the last few years. Whatever your interests, there is certain to be something for you – and if not in this limited catalogue then certainly from the complete catalogue of the *Libroservo de UEA*.
- **Leaflet 'Introducing ... EAB'** This new leaflet is *not* meant as a reminder if you have not yet paid this year's sub., but first to show you what is available from the EAB office, and second – and perhaps more importantly – for your use in enrolling a new member.
- Application form for this year's famous residential **Summer School** in Barlaston.
- A form for **joining JEB as a Patron** (see more on page 7).
- The **Agenda for EAB's AGM** in Felixstowe. See you there!
- The Summarised Accounts 2003–04.
- 'Membromarkfolio' por aligitaj membroj de UEA.

proponojn pri perantiĝo el ĉiuj landoj. Pli da abonoj subtenos la daŭran aperon de la revuo. Adreso: S-ro Hamzeh Shafiee, Revuo *Sabzandishan*, P.O. Kesto 17765-184, Tehran, Irano; rete: hamzeh@esperanto.org.

Kurioza manĝejo en Bruselo

La Gazetara Servo de SAT-Amikaro informis, ke malfermiĝis restoracio 'Esperanto' en Belgio: (15 rue d'Assaut / Stormstraat 15, BE-1000 Bruxelles / Brussel. La menuo estas kvarlingva (angla, franca, hispana kaj nederlanda), sur kiu oni pluinformas, ke 'Esperanto neniam atingis sian celon' kaj ke ĝi estas 'lingvo ne plu uzata'. Eble niaj legantoj emos sendi ĝentilan informon al la posedantoj, ke ili misinformiĝis.

(Mal)nova direktoro de UEA

La estraro de nia internacia organizaĵo nomumis s-ron Osmo Buller kiel la novan Direktoron de UEA. Li revenas al la posteno post kelkaj jaroj kiel direktoro de literatura instituto en sia hejmlando, Finnlando. Interesaj artikoloj pri Osmo kaj lia decido denove kandidatiĝi por la grava ofico estas legeblaj en la februara numero de la revuo *Esperanto*.

Mondial Usonen

En februaro la iam Berlina eldonejo Mondial (Ulrich Becker)

translokiĝis al Novjorko. Ĝiaj aktuale akireblaj libroj estas: 1. *Robinsono Kruso* de Daniel Defoe. Korektita reeldono de la Esperanto-traduko de 1908 de la koncizigita angla versio (ilustrita). 2. *Faŭsto* de Goethe. La giganta verko de la mondliteraturo kun la germana originalo por komparo (kompaktdisko). Eblas aĉeti la librojn nur per la ttt-paĝaro, uzante kreditkarton aŭ pagante per ĉeko: [/www.librejo.com/](http://www.librejo.com/).

Barlaston libraries

It has been announced that the village lending library in Barlaston is to move to Wedgwood Memorial College. This will become the third library on the site, with the important college adult education library and the EAB Butler Library, creating what has already been called the Barlaston Library Campus. Staffordshire County Council, Stoke-on-Trent City Council, the College and EAB's Management Committee are all equally keen to co-operate in promoting this interesting and prestigious development for their mutual benefit, in which Esperanto has the potential to be involved as a full partner.

Ĝangala televido?

La kampanjo por la unua televidkanalo en Esperanto jam aranĝis

MALLONGE

kun profesia entrepreno registradon de la unua reklama filmeto pri la Projekto ITV (Internaĉia Televido). La filmeto prezentos Flavio Rebelo, administranto de la projekto, prezentante al la esperantistoj kiel funkcios Internaĉia Televido en la praktiko. La filmeto estos disponebla por elŝuti kaj por laŭpete spekti ĉe la subportalo de la kampanjo ITV: www.gxangalo.com/televido. La ttt-paĝoj de gxangalo.com rikoltas laŭdire grandan sukceson kaj havas novaĵservon interalie ankaŭ en la araba. Multaj personoj tamen ankoraŭ ne komprenas kiel funkcios la unua televidkanalo tute en Esperanto. Pro tio, la administrantoj de la projekto disponigas kelkajn ekzemplojn de jam funkciaj televidkanaloj, kiuj elsendas laŭ la sistemo de interreta televido. Ekzemple, vizitu la anglalingvan kanalon Adventure TV, eventuale instalante la programojn mankantajn por ilin spekti (estas senpage, kaj preskaŭ ĉiu retejo ofertas la ĝustajn programojn por elŝutado) – tiel oni intencas, ke ITV funkciiu.

La 19-an de marto Flavio Rebelo, el Brazilo, vizitos la Londonan Esperanto-Klubon (sekr. Norah Brown, tel. 01277 218498; norah.brown@virgin.net) por elmontri la televidan projekton. Bedaŭrinde la sciigo venis tro malfrue por aranĝi pli

Membraro ☆ Membership

• New Members:

John Collins, Sheffield
Mark Drake, London
Darren Lampon, Nottingham
Mrs Melanie Evans, Bristol
Ros Fisher, London
Laura Miller, London
Thomas Shorney, Newnham-on-Severn
Prof. Humphrey Tonkin, West Hartford, USA
David Lilley, Ashby de la Zouch
Jeremy Sanders, Linthwaite
Kay Sanders, Linthwaite
Mr K. Williams, Towyn

• New Supporters:

Catherine Busch, Stourbridge

Marian Gilmour, Machynlleth
Robert Morris, Netherton

• Completed the Free Postal Course:

Carol Briscoe, Hove
Alison Elliman, Surrey
Marian Gilmour, Machynlleth
Jim Haworth, Darwen
Duncan Mceachran, Dumfries
Thomas Shorney, Newnham-on-Severn
Michael Taylor, Faversham
Mrs J.M. Wood, Bottisham

• Deaths:

Mr O.L. Bierley, Grimsby
Martin Howard, Braintree
Doris Hueting, Carterton
Daphne Lister, Manchester
Prof. Stanley Nisbet, Glasgow

vastajn kontaktojn – la brita kunlaboranto de la projekto estas Ian Fantom: editor@gxangalo.com; tel. 01635 38592.

Londona radio-intervjuo

La 15-an de decembro okazis kvin-minuta pertelefona intervjuo pri la Zamenhof-tago kun Helen Fantom en la tagmeza programo de Sandy Toxteth en la Londona loka radiostacio LBC.

Nature Friends

The January issue of the *Bulletin of Naturefriends* (bbottass@aol.com) contained two articles by Paul Hewitt mentioning Esperanto. One, titled 'Wikipedia and Naturefriends', introduced the online encyclopaedia, also reporting on the Esperanto version, the other article related the tale of a cycle trip to deliver a copy of *La Migranto* that involved finding an injured body that suddenly leapt to its feet and ran off when the emergency services were called!

Diccon Masterman

Kiel jam informite, la Universala Kongreso de 2006 okazos en Florenco, Italio. En la Landa Kongresa Komitato aniĝas internacie konataj aktivuloj, inter kiuj troviĝas brito Diccon Masterman kiel sekretario, iama Konstanta Kongresa Sekretario ĉe UEA kaj poste estrarano de UEA pri kongresoj. Li ĉi-jare ankaŭ kandidatiĝas kiel komitatano B de UEA. □

Laŭraporte, iu opinias, ke ne estas sufiĉe da ŝercoj en ĉi tiu bulteno, dum aliaj opinias, ke la tuto estas ŝerco. Sed jen alsendita amuzaĵo de Eric Walker. Ĉu vi povas provizi nin per pliaj?

Grava kazo

Malfrue iun vesperon juna kuracisto ricevis noton de tri amikoj: 'Bonvolu veni al la klubo kaj partopreni ludon de briĝo kun ni.' 'Jen,' li diris al sia edzino, 'jen oni denove forvokas min. Temas pri grava kazo – tri aliaj kuracistoj jam estas tie!'

Nekrologoj

• After a three-year battle, **Martin Howard** from Braintree succumbed to cancer and died on 21 December 2003. A Quaker Esperantist, Martin was a committee member of the Eastern Esperanto Federation for many years, also editing its bulletin *Orienta Stelo*. After acting as secretary of the British Esperanto Congress in Saffron Walden, he was elected president of the Eastern Federation. He gave lectures in Esperanto on his pottery, lastly at the British Esperanto Congress in Stoke-on-Trent.

• La 9an de januaro mortis **Dee (Doris) Hueting**, 86-jaraĝa. Ŝi instruis Esperanton kaj antaŭ kaj dum la periodo de la pli formala Oksforda Societo (ODES). Mi kredas, ke Geoffrey Greatrex estis unu inter dekoj da 'dek-lecionaj' studentoj ŝiaj. Esperantisto ekde 1936–7 – laŭ ŝia instruinto, amiko kaj kunlaboranto, Will Green – ŝi estis unu el la plej spertaj britaj esperantistoj. Antaŭ la milito, ŝi vere vivis en la lingvo. Kompreneble ŝi estis mia inspiranto. Ivor Hueting

• En decembro 2003 forpasis **Daphne Lister** el Manĉestro. Ŝi

prezidis en la loka Esperanto-grupo kaj estis notita Esperanta poeto (aperis mallonga prezento pri parto el ŝia verkaro en la pasinta numero de *EAB-Ĝisdate*). Pli ampleksa nekrologo aperos en *La Brita Esperantisto*.

• La 25an de februaro mortis **prof. Stanley Nisbet** en Glasgovo, kie li estis honora prezidanto de la loka Esperanto-societo. Li prelegis pri multaj temoj, tradukis kaj produktis informilojn kaj instruilojn de Esperanto. Plena nekrologo aperos en *La Brita Esperantisto*.

British Congress 2004

Felixstowe 30 April-3 May

Our programme is almost complete. Here is a quick guide. Please bear in mind that this is still provisional, but it will give you an idea of what to expect and when.

The congress starts at 15.00 on Friday, 30 April, but registration will be from 12.00; early birds may sit in the meet-and-chat room or explore the surroundings.

The afternoon programme features an opening debating/discussion group, floor scrabble session, lecture by Terry Page (17.00) on the Congresses in Boulogne – past and future, a walk and conversation classes. The meal (bar open at 18.30!) is scheduled for 18.45 and will take place in the main hall, to be followed by the opening ceremony and a language/music-quiz to be prepared for us by the guest lecturer, Ziko Marcus Sikosek. Esperanto videos will run until late for owls, similarly on Saturday and Sunday evenings.

Saturday sessions begin at 09.00 with a lecture by Ziko (*Anekdotoj el la historio de UEA*) which promises to be captivating. The EAB AGM follows at 10.30, and we are offering an alternative debating/discussion group for non-EAB members. There follow presentations by Simon Davis (*Kial la ĉielo bluas, kaj similaj demandoj*), Paul Gubbins (*Kaj en ondoj dronas ankaŭ verda stelo: W.T. Stead*) and Edmund Grimley-Evans (*Kiu estis Ŝekspiro?*). Special interest groups and conversation classes for beginners/progressors will run alongside. The banquet begins at 19.30 (bar open from 18.30) with a mid-meal toast by John Wells and post-banquet entertainment from Ziko.

Sunday begins with a presentation from Joyce Bunting (*John*

Constable vivis kaj pentris ĉi tie) – an excellent introduction for one of the excursion choices, followed by a ‘Meet-the-ManCom’ session in which the Management Committee and editors will be available to answer any questions relating to EAB that you wish to put. Questions are welcome on the day but please note that if your question is likely to require some research before they can answer effectively, it would be politic and polite to send it in advance. All such questions, headed ‘Meet-the-ManCom’, please send to the secretary of EAB, Geoffrey Sutton (addresses on page 2).

Just before lunch Ziko will present *Perspektivoj – la kunlaboro de informadanto kaj ĵurnalistoj*. The afternoon is free for excursions, and we are gathering together a list of possibilities. Our evening entertainment has the theme *One Hundred Years of Esperanto in Britain* and begins at 20.00 with a play specially written (in Esperanto) by Paul Gubbins. After a pause and refreshment we continue with individual contributions following the same theme.

Monday offers three presentations; Marjorie Boulton (*La unika situacio de Esperanta verkisto*), Ziko (*Mitoj pri la lingvo Esperanto*) and John Wells (*Juan Régulo Pérez kaj la eldonejo Stafeto*). Following the closing ceremony the afternoon is free for excursions and visits. More detailed information on the programme is now on the website www.BritishEsperantoCongress.co.uk

Hotel staff have requested that we give an indication of numbers of those wishing the Friday meal and Banquet a little while before the Congress; we cannot therefore guarantee meals for late bookers.

Local Congress Committee

Ekpaku!

☆ Plena listo de aranĝoj konsulteblas ĉe: www.esperanto.hu/kalendar.htm, aŭ sendu iun ajn retmesaĝon al la aŭtomato: kalendaro@esperanto.org

1–6 aprilo

Marturisma Internacia Renkontiĝo. Pula, Kroatio. Inf.: Kroatia Esperanto-Junulara Asocio, Kneza Mislava 11, HR-10000 Zagreb. Rete: keja_kroatio@yahoo.com

5–12 aprilo

20-a Printempa Semajno Internacia. Duderstadt, Germanio. Inf.: Wolfgang Bohr, Johannes-Kirschweg-Str. 11. Rete: psi@esperanto.de

6–10 aprilo

Akirado kaj lernado de du lingvoj kun Anna Löwenstein kaj Renato Corsetti. Inf.: Esperanto-Centro Kvinpetalo, Rue du Lavoisier, FR-86410 Bouresse, Francio. Tel/fakso: +33-(0)549428074. Rete: kvinpetalo@club-internet.fr

7–13 aprilo

28-a Internacia Junulara Festivalo. Abetone (Toskanio), Italio. Temo: Muziko kunigas homojn. Inf.: Francesco Maurelli, via G. Spontini 29, IT-00043 Ciampino (RM), Italio. Rete: ijf.admin@esperanto.it

8–12 aprilo

Plurnivela Internacia Kursaro. La Chaux-de-Fonds. Inf.: Kultura Centro, C.P. 311, Postiers 27, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando. Tel/fakso: +41-32-9267407. Rete: kce.esperanto@bluewin.ch

10–12 aprilo

59-a SAT-Amikara Kongreso. La Rochesur-Yon (Vendée). Inf.: Laborista Esperanto-Asocio, 67 ave. Gambetta, FR-75020 Paris.

10–17 aprilo

Infana Renkontiĝo. Grezjono. Inf.: Kastelo Grezjono, FR-49150 Baugé, Francio. Tel: +33-0241891034. Rete: grezjono.kastelo@free.fr

20–24 aprilo

Shakespeare kaj Ŝekspirajoj / Inicado al jago. Inf.: Kvinpetalo (vidu supre)

23–25 aprilo

Junulara Esperanto-Renkontiĝo. Hungario (Katicatanya, apud Kaposvár). Inf.: Vera Acsádi; rete: hej@eszperanto.hu

24 aprilo–2 majo

29-aj Esperantaj Tagoj de Bydgoszcz kun kurso de vojaĝgvidantoj. Inf.: Esperantotur, str. M. Skłodowskiej-Curie 10, PL-85-094 Bydgoszcz. Tel/fakso: +48-52-3461151; rete: turismo@bydgd.pdi.net

27 aprilo–1 majo

Zamenhof kaj medicino. Bouresse, Francio. Inf.: Kvinpetalo (vidu supre)

29 aprilo–2 majo
Seminario pri la Pflarĝigo de EU.
 Nova Gorica, Slovenio. Inf.: Anka Vozlic;
 anka.v@siol.net; tel: +386-1-7504383

30 aprilo–3 majo
86-a Brita Kongreso de Esperanto.
 Felixstowe. Inf.: BK 2004, 10 Marina
 Gardens, Felixstowe IP11 2HW. www.
 BritishEsperantoCongress.co.uk; rete:
 esperanto@btopenworld.com. (EAB-oficejo;
 tel. 0845 230 1887)

7–9 majo
5-a Trilanda Renkontiĝo de Germana
Esperanto-Junularo. Heppenheim. Inf.:
 Inge Simon, Simon-Esperanto@t-online.de

16–18 majo
Semajnfina Jarkunveno de SAT en
Britio. Barlaston. Inf.: EAB (vidu paĝon
 2). Rete: arturo@signalprent.demon.co.uk

22–23 majo
Kultura Semajnfino pri Ruslando. La
 Chaux-de-Fonds, Svislando (vidu supre)

28–31 majo
99-a Skota Kongreso de Esperanto.
 Peebles. Inf.: vidu [paĝon ????](#).

28–30 majo
SKEF-Kongreso. Brezová pod Bradlom,
 Slovakio. Inf.: Mária Tomašovinová.
 Tel. +421-903-528175

28–31 majo
81-a Germana Esperanto-Kongreso.
 Neubrandenburg. Inf.: Germana Espe-
 rantito-Asocio, Immentahlstr. 3, DE-79104
 Freiburg. Tel. +49-761-289299.

31 majo–4 junio
Ripozo ĉe la Balta Maro (apud
 Stralsund). Inf.: Gunter Ebert,
 Sanddornweg 62, DE-18439 Stralsund,
 Germanio. Tel. +49-3831-490003. Rete:
 gun.eb@t-online.de

21 junio–16 julio
Baltaj Esperanto-Tagoj, Litovio. Inf.:
 Esperantotur' (vidu supre)

22–27 junio
Folkloro Renkontiĝo en Bieno
Ŝlokenbeka. Inf.: M. Timermane, Kr.
 Valdemāra 145/1-32, LV-1013 Rīga,
 Latvio. Tel. +371-9115413. rete:
 mtimermane@yahoo.com

2–8 julio
Renkontiĝo de Esperantista Junularo.
 Kievo. Inf.: Mikaelo Lineckij, P.k. 91, Kiev
 201, UA-04201, Ukrainio. Tel. +380-44-
 4320743

3–21 julio
Somerstaĝoj en Grezijono. Francio. Inf.:
 Kastelo Grezijono, FR-49150 Baugé.
 Tel. +33-0241891034/grezijono.kastelo@
 free.fr

5–10 julio
Naturamika Semajno en Grindelvaldo
 (Berna Kantono). Inf.: KCE (vidu supre)

7–11 julio
Vivo kaj historio de pupoj kaj
vestokudrado. Bouresse, Francio. Inf.:
 Kvinpetalo (vidu supre)

10–17 julio
60-a Internacia Junulara Kongreso.
 Kovrov, Rusio. Inf.: UEA (vidu paĝon 2)

13–18 / 20–25 julio
Plurnivela Internacia Kursaro. La Chaux-
 de-Fonds, Svisio. Inf.: KCE (vidu supre)

18–22 julio
39-a Brazila Kongreso de Esperanto–
Maceió/AL, Brazilo. Inf.: C.P. 396,
 BR-57020-970 Maceio AL, Brazilo. Rete:
 ariknubxxi@ig.com.br

20–24 julio
Esperantaj gramatikajoj. Bouresse,
 Francio. Inf.: Kvinpetalo (vidu supre)

23–29 julio
Internacia Junulara Semajno. Hungario.
 Inf.: Hungara Esperanto-Junularo,
 P.k. 87, HU-1675 Budapest. Rete: hej@
 eszperanto.hu

24–31 julio
89-a Universala Kongreso de Esperanto.
 Pekino, Ĉinio. Inf.: UEA (vidu paĝon 2)

31 julio–3 aŭgusto
26-a Renkonto de Esperantistaj
Familioj. Malioš, Vojvodino, Serbio.
 Inf.: Fam. Csöke, H. Rákóczi Ferenc str.
 32, YU-24321 Malioš, Serbio/Montenegro.
 Rete: csoke@eunet.yu

2–6 aŭgusto
Naturamika kaj Romanĉa Semajno.
 Engadino, Svislando. Inf.: KCE (vidu supre)

6–8 aŭgusto
36-a Korea Kongreso de Esperanto.
 Iksan. Inf.: sunitaamo@hanmail.net

6–11 aŭgusto
Muziko kaj kantoj kun praktikado de
Esperanto. Bouresse, Francio. Inf.:
 Kvinpetalo (vidu supre)

7–14 aŭgusto
Kultura Esperanto-Semajno kaj
simpozio pri la esenco kaj estonteco de
Esperanto. La Chaux-de-Fonds, Svislando.
 Inf.: KCE (vidu supre)

7–13 aŭgusto
43-a Esperanto-Somerlernejo.
 Barlaston, Anglio. Inf.: Wedgwood
 Memorial College, Barlaston, Stoke-on-
 Trent ST12 9DG. Tel. 01782 372105;
 rete: wedgwood.college@staffordshire.
 gov.uk (vidu la artikolon sur paĝo 9 de
EAB Update, n-ro 24).

14–21 aŭgusto
8-a Bretona Renkontiĝo. Plouëzec. Inf.:
 J.-P. Ducloyer, 8 rue de Montauban, FR-
 35750 Iffendic. Tel. +33-(0)2 99 09 71 92.
 Rete: jeanpierre-ducloyer@club-internet.fr

14–21 aŭgusto
77-a SAT-Kongreso. Bratislava, Slovakio.
 Inf.: Petro Chrdle, CZ-25229 Anglická
 878, Dobříchovice, Ĉeĥio.

16–27 aŭgusto
38-a Internacia Esperanto-Feriado kun
lingvaj kursoj. Kudowa Zdroj. Inf.: Silezia
 Esperanto-Asocio, str. Dubois 3/1,
 PL-50-208 Wrocław, Pollando. Rete:
 vroclavo@poczta.onet.pl

17–22 aŭgusto
Romanika Arto en Piktavio (Poitou).
 Bouresse. Inf.: Kvinpetalo (vidu supre)

21–28 aŭgusto
Verda biciklumado ĉe Grezijono. Inf.:
 Kastelo Grezijono, Francio (vidu supre)

25–29 aŭgusto
6-a Esperanta Eŭrop-Unia Kongreso
kaj 63-a Hispana Esperanto-Kongreso.
 Bilbao. Inf.: Grupo Esperantista de Bilbao,
 Barrencalle Barrena 7-1 D, ES-48005
 Bilbao, Hispanio. Tel. +34-944-164492;
 rete: esperantobilbao@terra.com

3–6 septembro
72-a Itala kongreso de Esperanto.
 Treviso. Inf.: Itala Esperanto-Federacio,
 Flavia dal Zilio, Via Capella 17/2, IT-31059
 Zero Branco (TV), Italio. Rete: flavia.
 dalzilio@esperanto.it aŭ kuniklo@tiscali.it

1–7 oktobro/20 novembro
6-a Festivalo de Esperantaj Filmoj.
 Bratislavo, Slovakio. Inf.: Nataša Šandorová.
 Tel. +421-(0)905-138769

22–24 oktobro
Course-You-Can Speak Esperanto.
 Barlaston, Anglio. Inf.: Wedgwood
 Memorial College (vidu supre kaj www.
 esperantoeducation.co.uk)

27 decembro–3 januaro 2005
21-a Internacia Festivalo (por familioj
 kaj personoj de 25- ĝis 55-jaraĝaj),
 Magdeburg, Germanio. Inf.: Hans-Dieter
 Platz, Postfach 1148, DE-34303 Nieren-
 stein, Germanio. Tel/fakso: +49-5624-
 8007; rete: HDP@internacia-festivalo.de

21–23 januaro 2005
Ni Festivalu! – teatrumado kun Paul
 Gubbins, Barlaston, Anglio. Inf.: Wedg-
 wood Memorial College (vidu supre kaj
 www.esperantoeducation.co.uk)

25–30 marto 2005
Memorfesto okaze de la Centjariĝo de la
1-a Universala Kongreso de Esperanto
en 1905. Boulogne-sur-Mer, Francio/
 Anglio. Inf.: boulogne2005@online.fr □